Kopio. junio 1945.

UNUIĜO DE LA ESPERANTISTA MOVADO EN FRANCUJO

La diversaj francaj esp.organizaĵoj - neŭtralaj, laboristaj, instruistaj, religiaj, profesiaj - kunvokis unuecigan kongreson, kiu okazis en Parizo dum Pasko en nia malnova Sorbonne.

Pli ol du cent delegitoj, kiuj spite la cirkonstancojn venis el ĉiuj partoj de la lando, montris komunan intereson por la unuiĝo.

La afero estas des pli grava, ke ne nur komuna agado de ĉiuj esperantistoj en Francujo estas tiel preparata, sed ankaŭ ke la aplikado de Esperanto en ĉiuj fakoj ricevas tiamaniere gravan apogon.

La nova organizaĵo franca voĉdonita unuanime de la kongreso estas jena:

Oni dividas Francujon laŭ regionoj, kies divido tute similas al la nova divido preparita de la administrantaro de Generalo de GAULLE sub nomo "Commissaire de la République".

La Esperantistoj, kiuj ajn estas ilia deveno, aliĝas al la regiona Federacio ĉu rekte ĉu pere de loka grupo. Kiam en urbo estas sufiĉe multaj esperantistoj, pluraj lokaj grupoj povas ekzisti ĉu laŭ fako ĉu laŭ kvartalo.

La diversaj Regionaj Federacioĵ kaj ankaŭ koloniaj Federacioj grupiĝas en "Unuiĝo Esperantista de Francujo & Kolonioj" kiu anstataŭas nian malnovan S.F.P.E.

U.E.F. aliĝas ankaŭ rekte al I.E.L. kiel landa Asocio de la Internacia Ligo. Aliĝante al grupo aŭ al regiona Federacio, la membroj samtempe aliĝas al Fako, elektita de li. La fakoj jam preparitaj estas: Laboristoj - Instruado - Poŝtistoj - ~~Kkm~~ Policistoj - Katolikoj - Protestantoj - Judaistoj - Kvakeristoj - Komerco & Industrio (inklusive Asekuristoj kaj Bankistoj) - Sciencistoj - Kuracistoj kaj Farmacistoj - Advokatoj - Filatelistoj - Junulargastejanoj - Sportistoj - Profesiaj Artistoj - Trafiko - Fervojistoj - Radio.

La jara kotizo estas fiksita po cent frankoj, entenante ankaŭ la abonon al Franca Esperantisto.

Nia deziro estas, ke en aliaj landoj oni povu ankaŭ fari samajn aranĝojn tiamaniere, ke niaj fakaj sekcioj estu landaj sekcioj de Internacia Fako, aliĝanta al I.E.L. Tiamaniere I.E.L. havus en manoj la tutan gvidadon ne nur de la Esperantista Propggando, sed ankaŭ de aplik do de Esperanto en ĉiuj fakoj.

Restis nur unu malfacilaĵo, kiun nia kongreso sukcesis solvi. Temis pri U.E.A. kaj S.A.T.-anoj, -membroj. Principe se estas kelkaj membroj de tiuj asocioj, kiuj ne volas aliĝi al I.E.L. kaj deziras resti membroj de SAT aŭ UEA, ili tion povas fari, kreante en nia landa Asocio U.E.F. fakan sekcion de SAT-istoj aŭ de UEA-istoj, kiujn ni konsideros kiel filosofiaj fakoj. Kompreneble ni ne volas trudi iamaniere nian opinion pri la ĝenerala organizo de la Esperantista movado al landa asocio de IEL. Sed nia komuna laboro al ĉiuj kaŝita kaj dum la okupado montris al ni ke niaj apartigoj estas plene stultaj kaj ke kiam oni havas la grandan superecon posedi en tiu malbenita mondo fortan idealon, oni ne rajtas dispecigi ĝin per kverelo de butikaĉo.

Mi do esperas, ke kiel ni jam faris je la komenco de la internacia esperantista movado, nia lando montros ankaŭ je la fino de tiu milito la vojon sekvotan de la esperantistoj al la venko.

PIERRE PETIT

vic- prezidanto de U.E.F.
Zorganto pri la Internaciaj Aferoj.